Aŭstraliaj Esperantistoj

Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale
PLENUMITA 16/04/2020 Kvarcentsepdekkvara eldono (unua eldono 20/09/2011)

Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo*
Google Translate *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo*
Esperanta Retradio *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

Entute 722,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo

Nun studas **279,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **235,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **208,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun preparas Esperantan programon por francoj. (Ekde junio 2020 ?)
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde julio 2020 ?)

★★★

Surhavu vizaĝmaskon.



Unu terno povas elŝpruci ĝis 8 metroj

https://twitter.com/i/status/1245591199034929153

Roger Springer

★★★

Internacio". En tiu ekonomia kaj politika periodo de la historio de la homaro la enhavo de tiu kanto ankoraŭ estis valida, ĉar la kapitalismo ankoraŭ ne estis tiom fortega ke ĝi ne povus renversati. En unu okazo, dum la hispana interna milito inter la diktatoro Franco kaj la demokrate elektita oficiala registaro, tio okazis en Katalunio, kie oni anstataŭigis specon de fakunuiĝa ekonomio al la potenco de la kapitalismo. En si mem ĝi bone sukcesis, ĝis Franco venkis per la helpo de la franca kaj brita registaroj. En tiu periodo preskaŭ sukcesis alia "revolucio", kiu celis ŝanĝi la kapitalisman sistemon en Aŭstrujo al socialismo, per la helpo de la Laborista Partio. Tiam la konstrulaborista fakunuiĝo sekrete kaŝis pafilojn en kelkaj konstruataj domoj, por poste uzi ilin en putĉo kontraŭ la kapitalisma registaro. La intencita revolucio ne okazis, ĉar perfidisto informis la tiaman registaron. Fakte tuj post la unua mondmilito jam en Rusujo oni starigis senkapitalistan socion per la fabrik- kaj kampar-konsilantaroj (= sovjetoj), sed ĝi jam en 1920 malaperis ĉar per la konsilo de Lenin oni anstataŭigis ilin per "sovjetoj" de la komunista partio, kiu do praktike fariĝis la diktaturo ne de la "proletaro" sed de la partio kaj poste de Stalin, per kies helpo ni tamen venkis la eĉ pli kruelan diktaturon de Hitler.

Sed ĉiuj ĉi supraj klopodoj en tiu periodo ankoraŭ donis eblojn, kaj tial la enhavo de la kanto La Internacio estis tiam realeca, dum nun oni ne kantus ĝin ĉar oni ne plu kredas, ĝuste, ke oni povas venki la kapitalismon. Juĝu mem ĉu la enhavo de la kanto povas nun esti realisma kaj kredebla. Mi memoras nur la unuan strofon (kun la rekantaĵo), ĉar kutime oni kantis nur tiun:

Leviĝu, en mizer' dronanta, sklavar' malsata de la ter'.
Raci' nin vokas indignante, al mortbatalo pro liber'.
Malnovan mondon ni detruos, ĝis fundament' de l' tirani',
Kaj nian novan ni konstruos, ne nuloj, ĉio estu ni!
Por finlukto socia, ni grupiĝu en rond' / du-
Kaj la Internacio, triumfu en tutmond'/rek. foje

Ankaŭ vi verŝajne opinias, ke la enhavo de tiu kanto, miliardfoje kantita inter la du mondmilitoj, estas malaktuala, kaj oni ne plu kantas ĝin. Por mi ĝi do estas nur nostalĝiaĵo el de 1920 ĝis 1940. .

Marcel Leereveld.

ALIA HISTORIAĴO .

En la tempo ĝis proksimume la jaro 1930, la kantoj kaj ilia muziko estis verkataj nur de kaj por plenkreskuloj. Antaŭ tiu dato neniu kanto ekzistis en la "okcidenta mondo" kun junulaj esprimoj kiujn neniam uzus plenkreskuloj. Tio strange ŝanĝiĝis en 1930, kiam italnoma franco el la franca insulo Korsiko, nome de Tino Rossi, komencis profesie kanti siajn kantojn kun lingvo kiu altirus nur geinteraĝuloj, el de 12-jaraĝaj ĝis 20-jaraĝoj. Lia plej fama kanto, "Mi atendados", temas pri la suferoj de forlasita interaĝulino. Neniuj el la en tiu kanto uzataj esprimoj, francaj ĉikaze, uzatus de geplenkreskuloj en sia ama aŭ ĉiutaga vivo, tiam kaj eĉ nun plu. Kial li kaj aliaj popularaj kantistoj komencis tiun modon, oni ne scias, ĉar tiutempe la junulara klaso socia ankoraŭ ne estis grava parto de la ekonomia vivo: tio komenciĝis post la milito. Sed en la periodo de Tino Rossi kaj la aliaj mi kaj mia pli juna fratino kunkantis kun la modernaj junularaj kantistoj, post pli junaj ni povis kanti nur la popularajn kantojn por la plenkreskuloj: italajn popolkantojn, vienajn valsojn, kaj francajn kantojn. Tiun komencon en

la franca lingvo poste transprenis anglalingvaj junularaj kantistoj. Jen libera traduko de du strofoj kun intera rekanto de amkanto de alia franca tiama kantisto por la junularo:

Tiu kiun mi amas, eterne, posedas ĉarman vizaĝon kaj tute blankan korpon.
Dolĉe ridetajn lipojn kaj hararon kies belegeco faras min ĝojega.
Mi vidas ŝiajn tiom dolĉajn okulojn; mi aŭdas ĉie ŝian voĉon. /
Sub la ĉielo de mia bela Francujo ne ekzistas io pli agrablega./ rek.
Tiu kiun mi amas, kredu min, ne posedas robon de stulta prezo, nek juvelojn,
Tamen kiam mi rigardas en ŝian korpon mi tie malkovras mil trezorojn pli karajn.

Marcel Leereveld.

★★★

Vilhelmo Lutermano. Oliver Nachtwey montras kiel la pandemio kreis krizon de la kapitalisma sistemo kaj komparas la subvenciojn , kiujn preskaŭ ĉiuj registaroj decidis doni al la entreprenoj por ke homoj ne mortu pro malsato , kiam ili ne mortas pro la viruso, kun la universala baza enspezo ." La 1200 dolaroj al ĉiuj usonanoj estas unufoja senkondiĉa baz-enspezo " li skribas .Same kiel la post dua mondmilita periodo kreis la kondiĉojn por la Beveridge raporto , kiu kondukis en 1942 al la starigo de la sansistemo en Britujo, la pandemio kreas la kondiĉojn por forgesi pri la ekonomio de merkato kaj elpensi pli socialisman sistemon.
Sendis *Franciska Toubale*

★★★